### [Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)] Aperis la ĉarto de volontulaj rajtoj

*Malsukcesa elŝuto.*

### Kontakto: Konsumismo: Ne forgesu la venontan limdaton por kontribui al Kontakto.

Ĉu vi bezonas inspiron? Legu niajn temo-proponojn! Legu pli: http://kontakto.tejo.org

### Karavanoj al JES

Karavano de Strasburgo (por Francoj), Akeno (por Belgoj) kaj Venlo (por Nederlandanoj) tra Germanio (por Germanoj ankaŭ) estas nun preta, ankaŭ ĝia aliĝilo. Tiujn karavanojn prizorgas Alekĉjo. Se vi interesiĝas pri tio, mi invitas vin legi la artikolon pri ĝi: http://alesk.eu/karavano/2012/10/11/anonco-por-la-karavano-al-jes/ aŭ jam aliĝi: http://tinyurl.com/jes2012 aŭ viziti la paĝon de la FB-evento: http://www.facebook.com/events/189595324478767 aŭ kontaktu: alekĉjo ĉe gmail.com (Atentu c x estas ĝusta)

Karavanon de Ĉeĥio kaj Slovakio planas Vit. Kontaktu: esperanto.vit ĉe volny.cz

### Promeskampanjo de Vinilkosmo

Promeskampanjo de Vinilkosmo ĉe http://goo.gl/5pvMO Vinilkosmo esploras pli aktivan, partoprenigan kaj sukcesan manieron por produkti kaj eldoni novajn diskojn de Esperanto-artistoj, kaj invitas la muzikŝatantojn rekte helpi por decidi kiuj diskoprojektoj estu produktitaj kaj eldonitaj. Pro tio Vinilkosmo decidis lanĉi ĉi tiun « Promeskampanjon » en kiu estas prezentintaj diversaj eldonprojektoj kaj por kiuj homoj faru aĉetpromeson por povi ilin eldoni. Estos eldonitaj sur KD-oj nur la projektoj, kiuj ricevos la sufiĉan kvanton da aĉetpromesoj por kovri la produkto- kaj eldonkostojn. Se minimuma kvanto ne estos atingita la KD ne eldoniĝos, sed estos esplorita ĉu tamen sufiĉos por produkti la albumon nur por elŝutado en la VK-elŝutejoj. Kompreneble se ne kolektiĝos sufiĉaj promesoj la projektoj ne aperos; tio dependos de vi kaj viaj deziroj. Vi trovos, en ĉi tiu ligo http://goo.gl/5pvMO, dokumenton por mendi la albumojn ĉu fizike (KD) ĉu elŝute laŭ formatoj mp3, ogg kaj flac. Sufiĉos indiki kion vi deziras precize elektante kiujn diskojn vi ŝatus ke estu eldonitaj. Povas esti ke pliaj proponoj de aliaj artistoj alvenos intertempe tiam ni aperigos apartajn informojn kaj eventuale aldonon al la promeskampanjo. Ni antaŭdankas vin pro via aktiva partopreno kaj subteno en la muzika eldonado. Plej muzike salutas Flo ! Nome de la Vinilkosmo teamo

### [Esperanto] Pixamandurries 2012, nova kanzono en esperanto

Pixamandúrries (2012) - Tempiĝas temp'. Nova kanzono en esperanto kaj kataluna. Rigardu: http://www.youtube.com/watch?v=UAqntQzKkjc

### 44a Korea Kongreso de Esperanto, Hanmaeum Jayeon Hakgyo en Jangseong, Koreo, 27a kaj 28a de oktobro 2012

Rigardu: https://www.facebook.com/events/437603652941932/

### 1a skolta rendevuo, Rosée, Namur, Belgio, 2a ĝis 4a de Novembro

Unua rendevuo por la verdaj skoltoj! Nia projekto: proponi skoltumadon al la esperantistaj adoleskantoj! Pli da informoj sur nia retejo: http://verdajskoltoj.wordpress.com/

### 9-a Rata Rendevuo „Tra urbo kaj vilaĝo“ kun koncerto de "Kapriol", Hameln, Germanio, 3a kaj 4a de novembro 2012

La "Ratkaptista Bando" kore invitas al la 9-a Rata Rendevuo „Tra urbo kaj vilaĝo“ kun koncerto de "Kapriol" kaj festo „25 jaroj Ratkaptista Bando“. Pli da informoj sur la retpaĝo de la Ratkaptista Bando: http://www.esperanto.de/hameln

### KLERIGKURSO, STUDSESIO ĉe Germana Esperanto-Centro en Herzberg

Oferto de la Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo en 2012 pri instrukapabligo, movada trejnado. Detaloj: http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=61311937

Jarkalendaro por 2012: http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=91295910

La sekva (57a) Studsesio: decembro 14-16: (studmodulo kaj Zamenhof-festo la 15an de decembro okazonta en la Esperanto-Hotelo Zum Pass en Herzberg/Sieber)

Ĉeftemoj: Esperanto kaj muziko, Esperanto kaj filmoj, historio: rerigardo al la 125-jara ekzisto de la lingvo. Temogvidantoj: Peter Zilvar, Zsófia Kóródy

### Venontaj renkontiĝoj

13a KEKSO, Potsdam, Germanio, 19A ĜIS 21A DE OKTOBRO 2012
http://www.esperanto.de/gej/kursoj/kekso/aliĝilo.php?lingvo=eo

Lingva Festivalo, Ĉeboksary/Ŝupaŝkar, Rusio, 20an kaj 21an de oktobro 2012 http://www.lingvafestivalo.org aŭ Massimo info ĉe esperanto21.org

Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj, Kastelo Greziljono, Francio, 27a de oktobro ĝis 3a de novembro, http://www.gresillon.org/autune

Klaĉ-Kunveno Post Somera - KKPS, Delft, Nederlando, 2a ĝis 4a de novembro 2012
https://www.facebook.com/events/256141727826605/ kaj http://klaĉkunveno2012.wikispaces.com/hejmo (atentu: c x estas ĝusta retadreso)

2-a BIERo, Žatec, Ĉeĥio, 9a ĝis la 11a de novembro 2012 http://mladez.esperanto.cz/?p=1087&lang=eo

29a IF, Dortmund, Germanio, 27a de decembro 2012 ĝis 3a de januaro 2013 http://www.internacia-festivalo.de

Novjara Renkontiĝo / NIS, Xanten, Germanio, 27a de decembro 2012 ĝis 3a de januaro 2013
http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#alighilo

31a Komuna Seminario 2012, "Takaonomori Wakuwaku Village” apud Monto Takao, en Urbo Hachioji en Tokio, Japanio, 28-30a de decembro 2012, https://sites.google.com/site/komunaseminario2012/esperanto

4-a Junulara E-Semajno, Naumburg, Germanio, 28a de decembro 2012 ĝis 4a de januaro 2013, http://www.facebook.com/junularaesemajno kaj http://www.jes.pej.pl

4-a NOVA - Novjara Aranĝo, Praia da Pipa, RN (Norda Riogrando), Brazilo, 3a de januaro ĝis 6a de januaro 2013, http://novjaraaranĝo.wordpress.com/ (atentu: g x estas ĝusta retadreso)

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu